



# Eventoj

Redakcia adreso:  
Budapest, pk. 87.  
H-1675, Hungario  
Telefono kaj telefakso:  
(+36-1) 1288-258

Internacia Sendependa Revuo pri la Esperanto-Movado decembro (2) - '92

Estimata,

plej unue ni volas danki al Vi, ke Vi apar-  
tenis al niaj konstantaj legantoj en 1992.

Estis granda defio entrepreni la eldona-  
don de 2-semajna E-gazeto, sed malgraŭ  
ĉiuj problemoj, ni opinias, ke fine sukcese  
ni venkis la obstaklojn. Nune EVENTOJ es-  
tas la plej ofte aperanta periodaĵo en Es-  
perantujo, ĝin abonas pli ol mil esperantis-  
toj en pli ol 40 landoj, inter ili tre multaj ak-  
tivuloj, gvidantoj de niaj E-organizoj! Ni  
pruvis, ke jes, tamen eblas fari ion en nia  
komunumo, kion la plejmulto konsideris  
neebla. Kaj tiu ĉi estis nur la unua paŝo...

Ekde aŭtuno pro multaj faktoroj ni havis  
la problemon pri daŭra malfruo, tamen ni  
plenumis nian promeson pri monate du-fo-  
ja aperado. Regule ni informis pri la even-  
toj de nia Esperantujo, kaj transprenis arti-  
kolojn el ĉ. 70 aliaj E-revuoj, periodaĵoj.


Ni tre dankas al Vi la kuraĝigajn, gratu-  
lajn leterojn, kaj dankas la senditajn artikolojn,  
leterojn, informojn. Ni volas, ke ankaŭ  
estonte Vi estu ne nur leganto, sed ankaŭ  
kunlaboranto de EVENTOJ. Daŭre ni ĝoje  
atendas viajn leterojn! Ni volas, ke ankaŭ  
estonte Vi konsideru ĝin kiel nia komuna  
esperanta gazeto.

Ni esperas, ke vi estas kaj estos konten-  
ta pri la enhavo de EVENTOJ. Ni petas Vin,  
renovigu vian abonon por la nova jaro! La  
baza abonkotizo estas 59 guldenoj, - kiu  
malgraŭ la drasta kresko de kostoj signifas  
reale neŝanĝitan prezon, ja en '92 ni startis  
nur en marto. Por esperantistoj el la eks-  
soclandoj ni ofertas speciale rabatitan pre-  
zon de 23 guldenoj!

Aparte ni petas vian helpon pri la popu-  
larigo de EVENTOJ. Montru ĝin en via E-  
klubo, al viaj konatoj, kaj helpu al la aliaj  
aboni ĝin! Ni opinias, ke ĉiu esperantisto  
bezonas iun konstantan informan ligilon al  
la movado. Ni esperas, ke kun via helpo en  
'93 signife kreskos la nombro de legantoj,  
des pli, ke nur tio povas firmigi la financon  
flankon de la aperigo.

Do, venante al la lastaj vortoj en '92, ni  
deziras al Vi agrablajn  
jarfinajn festotagojn,  
multajn sukcesojn, fel-  
ĉojn ankaŭ en via privata  
vivo, kaj multan ĝojon  
ene de nia E-komunumo.

Starante je via servo,  
nome de nia tuta teamo:



Szilvási László

## Nomoj de Lazar Markoviĉ Zamenhof

Zamenhof, iniciatinto de Esperanto, nas-  
kiĝis judo en la orienta parto de la Rusa  
Imperio. Li mem preferis uzi la terminon  
*ruslanda hebreo*, ni tamen restas ĉe la vorto  
judo, tuj vi vidos kial. La judaro tie en la 19.  
jarcento apartiĝis de la aliaj etnoj (laŭ la  
zamenhofs termino *gentoj*) ne nur religie,  
sed ankaŭ lingve: ili parolis la *jidan* (aŭ *jidi-  
ŝan*) lingvon. La jida — malgraŭ PIV — ne  
estas germana dialekto, sed tute memstara  
lingvo, eĉ pli malnova ol la germana.

Jidajn tekstojn oni skribis per kvar alfabe-  
toj. La elekton determinis la socioj, en kiuj ili  
vivis. Precipe la kulturo de germanoj, poloj,  
litovoj kaj rusoj influis la jidan kulturon, do,  
ili uzis gotajn, latinajn aŭ cirilajn literojn.  
Krom tio — ĉefe por ekleziaj celoj — oni uzis  
ankaŭ hebreajn literojn. La *hebreo* estis la  
lingvo de la antikvaj judoj, la lingvo de la Ma-  
nova Testamento. La jida kaj la hebreo ling-  
voj ege diferencas: la unua apartenas al la  
hindeŭropa lingvofamilio, la dua al la semida.  
Kaj la lasta averto: neniu el la menciitaj ling-  
voj estas identaj kun la *ivrita*, lingvo de la mo-  
derna Israelo. La *ivrita* estas *planningvo*  
iniciatita en 1945, t.e. multe pli juna plan-  
lingvo ol la Internacia Lingvo Esperanto  
iniciatita en 1887.

Post tiom da enkonduko estas evidente,  
kial judo naskiĝinta en la tiam Rusia ricevis  
nomon en tri lingvoj: en la lingvo de la juda  
eklezio (hebreo), en la lingvo de la cetero (jida)  
kaj en la oficiala, ŝtata lingvo (rusa). Oni do  
dokumentis plej precize la oficialan (precipe ĉe  
knaboj pro la serva servo). Ekzemple la patro  
de „nia” Zamenhof ricevis nomojn la hebrean  
*Mordehaj*, la jidan *Motel* aŭ *Mordhe* (ĝia  
de rusoj kripligita nomo estis *Mordka*) kaj la  
rusan *Mark*. Lia filo ricevis la hebrean nomon  
*Eliezer*, kiun li neniam uzis, sed ankaŭ la jida  
*Lejzer* restis en la matrikulo, ĉar li uzis kon-  
sekvenca la rusan *Lazar*.

La nomo en la rusa lingvo enhavas ankaŭ  
la genitivon de la patro nomo. Do, lia kom-  
pleta, oficiala nomo estis *Lazar Markoviĉ  
Zamenhof*. Tiujn, kiuj konas tiun lingvan  
ordon, tute ne konfuzas la fakto, ke en do-  
kumentoj kelkfoje aperis ankaŭ *Lazar Motelev  
Zamenhof*, aŭ *Lazar, filo de Mordka*. En mal-  
longigita formo ĉiuj variantoj estas *Lazar M.  
Zamenhof*, kiun formon li uzis. Sed plej ofte  
li subskribis nur L. Zamenhof.

De la patrino kaj de la juda kvartalo de  
Bjalistoko li lernis la *jidan*, poste frekventis  
jidlingvan bazlernejon. Pli malfrue li publiki-  
gis pri la jida gramatiko, postlasis ampleksan

studon pri ĝi, verkis, eĉ versis en la jida kaj  
tradukis el la jida literaturo en Esperanton. Li  
estis jide parolanta judo, tamen ĝenerale es-  
tas akceptebla uzi nur lian rusan nomon. Ne  
nur tial, ĉar ĝi estis la oficiala, sed ankaŭ pro  
alia kialo.

Lia patro estis Mark Fabianoviĉ Zamen-  
hof, instruisto de geografio kaj modernaj ling-  
voj, poste ŝtata cenzuristo pri jidaj kaj hebreaj  
presaĵoj. Li estis pioniro de la klerisma movado  
inter judaj intelektuloj, klopodanta ĉesigi per  
kompleta asimiliĝo (rusiĝo) la apartecon de ju-  
doj, forlasante la etnajn kaj religiajn apartaĵojn.  
Tial la *rusa* estis la hejmolingvo (kvankam la  
patro ne bone parolis ĝin).

Lazar pli kaj pli konsideris la rusan *amata  
gepatra lingvo*, frekventis rusan gimnazion,  
verkis en la rusa, tradukis en ĝin kaj tradukis  
multon el la rusa literaturo en Esperanton.  
Ankaŭ lia *materna* lingvo estis la rusa, li edukis  
stajn infanojn en ĝi. La ruseco de la familio  
estis tiel forta, ke ankaŭ lia filo, Adamo, post  
la unua mondmilito pola ŝtatano en la jam  
sendependa Polio, ne nur la rusan uzis en  
sia familio.

El tio ne estas evidente, ke Zamenhof —  
kvankam Bjalistokano, poste Varsovioano —  
ne estis pole. Li estis ruso, aŭ — se vi tion  
preferas — rusiĝinta judo, kiu bone konis kaj  
tre ŝatis ankaŭ sian unuan gepatran, etnan  
lingvon, la *jidan*. Kaj amas sian tutan etnon,  
kies amasoj ne rusiĝis, kaj parolis la rusan  
malbone, kiel tradiciaj judoj.

Ekde 1887 dum kelkaj jaroj li uzis la  
plumnomojn *Esperanto*, *Draco Esperanto*, aŭ  
aŭ *D-ro Esperanto*. En la jida lingvo poro-  
kaze li uzis ankaŭ la patron nomon apud aŭ  
anstataŭ *Lazar* (Ludwik Markoviĉ, Lud-  
vigo Lazaro). Li uzis ankaŭ la plumnomojn  
*Ganzefonj Unuel*, *Homu Slim* kaj. En Espe-  
ranto ekde 1904 li konsistenc uzis la al-  
prenitan nomon L. L. Zamenhof, kiu unuaj  
literoj estis en esperantigoj nomo Lazaro  
Ludoviko, en la franca *Lazarre Louis*, en la  
pola *Lazar Ludwik*, en la germana *Lazar  
Ludwig*, ktp.

En svedaj, portugala kaj ĉefe en germa-  
naj publikaĵoj li uzis ankaŭ la formon *Samen-  
hof*, ke germano prononcu ĝin *Zamenhof* (ja  
la prononco de *Zamenhof* estus *Camenhof*).  
Tamen, tiu formo iom post iom malaperis,  
kaj en la germana jam de longe oni skribas  
nur *Zamenhof*, kaj ankaŭ prononcas ĝin tiel,  
ĝuste.

Árpád Rátkai, Hungario

## La Internaciaj Junularaj Kongresoj laŭlande

En la jam, kutima formo ĉi-foje ni prezentas la laŭlandan dividon de la kvindek internaciaj junularaj kongresoj. Do, inkluzive ankaŭ la venontajn: en Vraca (1993) kaj je en Koreo (1994).

La plej multaj kongresoj okazis en Nederio (9) kaj en Germanio (5) — en tiuj du landoj okazis pli ol kvarono de la kongresaro. Sekvas Britio (4), Bulgario (3), Svedio (3), Polio (3) kaj Francio (3). Entute la unuaj sep landoj okazigis pli ol duonon de la kongresaro.

Komparante la unuajn 25 kongresojn al la lastaj 25, ni povas konstati ke la laŭlanda disdividiĝo kreskis. I.a. ankaŭ tio demonstras la geografian disetendiĝon de Esperanto.

Dika teksto montras la 25 lastajn kongresojn.

1939	Belgio
1955	Italio
1965	Japanio
1968	Hispanio

1973	Bosnio-Hercegovino
1976	Grekio
1980	Suomio
1981	Meksikio
1982	Belgio
1986	Israelio
1988	Kroatio
1990	Kubo
1992	Kanado
1994	Koreo
1952 1975	Danio
1953 1970	Aŭstrio
1966 1983	Hungario
1949 1957 1976	Francio
1959 1972 1987	Polio
1962 1969 1991	Svedio
1963 1978 1993	Bulgario
1947 1961 1971 1984	Britio
1950 1956 1958 1974 1985	Germanio
1939 1948 1951 1954 1960	
1964 1967 1979 1989	Nederio

Árpád Rátkai

Parolo de L.L. Zamenhof en St. Peterburgo, en 1910

## NE KROKODILU!

Vi eble miros ke mi parolas al vi ne ruse, sed esperante; vi eble diros, ke ĉar ni havas nun kongreson de samregnanoj kaj ĉiuj, aŭ almenaŭ preskaŭ ĉiuj ĝiaj partoprenantoj komprenas tre bone la saman lingvon, estas multe pli nature paroli al ili en tiu lingvo. Ekzistas tamen gravaj kaŭzoj, pro kiu ni batalas kaj por kiu ni kunvenis.

Niaj kongresoj, ne sole la universalaj, sed ankaŭ la naciaj, havas antaŭ ĉio signifon instruan kaj edukatan. Esperantistoj disĵetitaj en diversaj urboj kaj urbetoj, kunvenas en pli aŭ malpli granda amaso, por aŭdi nian lingvon, por kontroli, ĉu ili bone ĝin komprenas, por kompari sian propran manieron de parolado kun la parolmaniero de pli spertaj esperantistoj. Kiam ili poste revenas hejmen, ili ne sole mem parolas pli pure, sed ili alportas modelon de bona parolado al tiuj, kiuj restis hejme. Tiamaniere la kongresoj reguligas la uzadon de la lingvo, kaj dank' al niaj kongresoj jam nun oni parolas Esperanton perfekte egale ne sole en la plej malproksimaj anguloj de ĉiu aparta regno, sed en ĉiuj plej malsamaj lokoj de la tuta tera globo. Jam nun, kiam oni aŭdas bonan kaj spertan oratoron, oni neniel povas diveni, al kiu nacio aŭ lando li apartenas. La plena aŭtonomia vivo de nia lingvo, kun ĝia absolute propra, ne pruntita kaj ne imitita spirito, ĉiam pli kaj pli fortikiĝas tiamaniere, kvazaŭ ĉiuj esperantistoj de la mondo loĝus kune sur unu malgranda peco da tero.

Ne malpli grava estas la eduka signifo de la esperantistaj kongresoj. Izolitaj esperantistoj, kiuj neniam havis la eblon praktike apliki tion, kion ili lernis, ofte dubas, ĉu efektive per Esperanto oni povas tute

bone interkompreniĝi. Eĉ interne de la esperantistaj gru-

poj oni ofte ne kuraĝas paroli esperante, oni balbutas, oni preferas paroli ensianacialingvo, kaj proporcie al la nekuraĝeco de la parolado aperas ankaŭ nekuraĝeco de propagando, ĉar la esperantistoj-balbutantoj malgraŭ vole ne povas liberigi sin de la timo, ke eble tamen Esperanto estas afero pli teoria ol praktika. Sed kiam la balbutanto venas al kongreso, kie li havas la eblon aŭdi bonajn kaj spertajn esperantistajn oratorojn, kiam li persiaj propraj oreloj kaj okuloj konvinkigas, kiel bele kaj flue oni povas paroli en Esperanto, li entuziasmiĝas, li vidas, ke li laboras por io viva kaj vivoplena, li revenas hejmen kun nova kuraĝo kaj energio. Niaj kongresoj, ne sole la universalaj, sed ankaŭ la lokaj, tiamaniere, edukas konvinkitajn, sekve ankaŭ entuziasmajn batalantojn por nia afero.

Tio estas la ĉefaj motivoj, pro kiuj ni en ĉiuj niaj kongresoj, ne sole en la universalaj, sed ankaŭ en la naciaj aŭ regionaj, nepre devas paroli ne sole pri Esperanto, sed ankaŭ per Esperanto.

El "Argentina Esperantisto",  
jul/aŭg/sep.1992.

## REGULARO PRI LA BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA

### Artikolo 2.

1) Rajtas konkursi ĉiu esperantisto, kiu ne gajnis dum la tri tuj antaŭaj jaroj unuan premion en la branĉo por kiu li konkursas. Unu persono povas partopreni per maksimume 3 verkoj en ĉiu literatura branĉo; la nombro da verkoj de unu persono en la fotografia branĉo ne estas limigita. Ĉiun verkon de unu persono en iu branĉo oni aparte juĝas. Por kovri la elspezojn de la korespondado, ĉiu konkursanto aldonas (se tion permesas la postreguloj de lia lando) kvin korekte stampitajn internaciajn respondukuponon por ĉiu branĉo en kiu li konkursas.

2) La konkursanto devas signi ĉiun partoprenaĵon per pseŭdonimo kaj aldoni - en fermita koverto - slipon kun pseŭdonimo kaj la vera nomo kaj adreso. Sur la koverto oni skribu nur la pseŭdonimon kaj la branĉo(j)n prenata(j)n.

3) Nevalidaj por la Konkursoj estas verkoj aperintaj en presa formo. Ĉiu konkursanto konsentas, ke la rajto pri unua presigo de premiita verko apartenas al UEA, kaj devigas sin ne publikigi ĝin aliloke, krom se UEA rifuzas la presigon. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, sed li konsentas cedi ĝin senpage en okazo de la eldono de almanako aŭ antologio de la Belartaj Konkursoj, kondiĉe ke tiu aperu kun la aprobo de UEA. En la fotobranĉo la aŭtoro cedas al UEA la rajton je unufoja publikigo de la konkursaĵo.

4) La konkursantoj en la literaturaj branĉoj devas liveri al la sekretario de BK po 4 kopiojn de ĉiu el la konkursaĵoj. La tuta konkursa materialo devas atingi la sekretarion de BK plej malfrue la 31-an de marto. Konkursaĵoj por la branĉo eseo originala (Premio Luigi Minnaja) devas esti klare signitaj ĉe la komenco per tiuj vortoj. Konkursaĵojn por la branĉo fotografio oni devas sendi en 1 ekzemplero al "Fotokonkurso", per adreso de la Loka Kongresa Komitato de la venonta Universala Kongreso por atingi tiun adreson plej malfrue la 1-an de julio.



## Aranĝoj

### SKOLTO '93

Skolta Esp-Ligo invitas la geskoltojn partopreni la internacian skoltan tendaron SKOLTO-93, inter 3-13a de aŭgusto 1993.

La tendaro okazos apud Opava en Ĉeĥoslovakio. La ĉirkaŭaĵo de la tendarejo ĝis nun estis fermita milit-areo, do la naturo estas netuŝite konservita.



Estas antaŭvidataj tipaj skoltaj programoj kaj aktivado, krome kompreneble ankaŭ e-kursoj. Minimuma aĝo por partoprenantoj: 10 jaroj.

La kotizo por okcident-eŭropanoj: 4500 BEF, por eksociandanoj: 1200 KCS.

Aliĝilojn kaj pluajn informojn petu de Jan Pisala, E. Krasnohorské 1, CS-74601 Opava, Ĉeĥoslovakio, aŭ de:

Arie Bouman,  
Driesdreef 8, B-9030 Gent, Belgio.

## UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, 1993

24-31 de julio 1993, Valencio.

Por partopreni la UK-n, ĉiu devas pleniĝi apartan aliĝilon. La kongreskotizo donas la rajton partopreni en ĉiuj (publikaj) programoj, sed ne inkluzivas la hotel-maĝokaj asekurajn kostojn. La kotizoj varias depende de la loĝlando laŭ la jena grupigo:

A: Ĉiuj landoj escepte de tiuj menciitaj ĉi-sekve sub B.

B: Albanio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hungario, antaŭa Jugoslavio, Rumanio, Polio, antaŭa Sovetunio, ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), Afriko kaj Latina Ameriko.

La kotizoj ĝis 31.12.92. estas 263 NLG (= landoj A), resp. 197 NLG (= landoj B). Individuaj membroj de UEA ĝuas rabaton de 53 NLG (= landoj A) respektive 39 NLG (= landoj B). Ekde 1-a de januaro la partoprenkotizoj kreskas je 25 %-oj!

Petu aliĝilon de via landa asocio, aŭ rekte de

Centra Oficejo de UEA  
Nieuwe Binnenweg 176,  
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Jam la 17-a!

## Internacia Semajno de Esperanto

Venontsomere la internacia semajno okazos inter la 12-a kaj 19-a de septembro ĉe la mediteranea marbordo, en havenurbo Sète, 30 km-ojn okcidente de Montpellier, en bela parko apud la maro.

Ni proponas al Vi lerni aŭ perfektigi vian scipopon pri esperanto en tri-nivelaj kursoj kun eminentaj instruistoj.

Kiel ĉiujare, vi trovos vere internacian etoson. Tre modestas la restadkostoj kaj eblas tendumi proksime. Petu detalajn informojn kaj aliĝilojn ĉe:

Centre Culturel Esperanto de Montpellier,  
5 rue du Docteur Roux,  
F-3400 Montpellier, Francio.  
Telefono: +33-67-541543

**PRI VIA ARANĜO SENDU  
ĜUSTATEMPAJN INFORMOJN,  
PREFERE KUN ILUSTRAĴOJ!  
EN URĜAJ KAZOJ UZU TELEFAKSON!**

**POR PLIAJ DETALOJ PRI IU ARANĜO  
TURNU VIN REKTE AL LA  
MENCIITA ADRESO!**

La unua

## Internacia Kultura kaj Turisma Semajno

IKTS (Internacia Kultura kaj Turisma Semajno) okazos inter la 9-a kaj 16-a de oktobro 1993 en Sant Cugat del Vallès (15 km-ojn apud Barcelono), organizata sub la aŭspicio de Hispana Esperanto-Muzeo.

Estas antaŭviditaj prelegoj, diversaj kursoj, vesperaj aranĝoj (teatroj, ktp), kaj ankaŭ ekskursemuloj estos kontentaj...



Ne timu la okton, la ĉi-tiea temperaturo estas ĉ. 20 °C, kun oftaj agrablaj kaj sunaj tagoj!

Por tiu ĉi unua IKTS ni antaŭvidas nur ĉ. 50 partoprenantojn, do ne prokrastu vian aliĝon, se vi volas certe havi lokon! "Evidu nian kutimon - Manana!"

Pliajn detalojn, aliĝilon petu de:

Hispana Esperanta Fervojista Asocio,  
Pk. 15027, E-08080 Barcelono,  
Katalunio, Hispanio.

## Sanmarinaj Universitataj Sesioj (SUS)

Inter la 1992.08.29 kaj 09.05 estis aranĝita jam la 11-a Sanmarina Universitata Sesio, SUS de la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS). Dum ĝi efektiviĝis multaj altnivelaj kursoj kaj prelegoj en ĉiuj 6 sekcioj de la Akademio, (nome sekcioj kibernetiko, humanistiko, struktursciencoj, filozofio kaj morfosciencoj). Fine de la sesio okazis finaj ekzamenoj de tiuj, kiuj finis sian studadon ĉe AIS kaj de tiuj, kiuj adapte adoptis sian aliloke akiritan sciencan gradon (kio estas kondiĉo por sekvanta plustudado ĉe AIS).

Krome, kiel tradiciaj programoj de SUS okazis partopreno de la solenaĵo omaĝe al la novjara festo (novjara laŭ la Sanmarina kalendaro, do la 3-a de septembro, kiam ni komune eniris la 1692-an jaron post la fondiĝo de la respubliko San Marino), ĝeneralaj asambleoj de la scienca kaj subtena sektoroj, kunveno de la Senato de AIS, kaj krome restis iom da tempo por porokaza dancvespero...

La sesio tamen havis bedaŭran mankon. La altnivelajn kursojn kaj prelegojn de bone preparitaj profesoroj kaj docentoj ĉeestis nur malmultaj aŭskultantoj. Pri la malmultenombra partopreno (60 perso-

noj) kulpas parte neekzisto de malmultekostaj studentaj domoj kaj tranoktejoj en San Marino Città, sed certe ankaŭ nia malfika varbado. Ambaŭ faktorojn ni volas plibonigi, por ke la 12-a SUS, kiu efektiviĝos 1993-08-28/09-05 allogu en San Mariron pli da studentoj.

Paralele kun la venonta SUS okazos en San Marino 1993-09-02 posttagmeze simpozio kun la temo "Universitataj sistemoj kaj ilia harmoniigo" kiel ero de la kadra programo de la sesio.

Al la sekvajara SUS veturos aparta aŭtobuso de Prago, kio poste surloke staros je la dispono de ĉeestantoj (ekz. veturigas ilin al la malmultekosta tranoktejo).

Post la sesio per la sama aŭtobuso oni povos veturi al Prago, kie inter la 11-a kaj 17-a de septembro okazos stud-sesio de Ĉeĥa Filio de AIS.

Pri ĉiuj aferoj rilate al AIS respondos senata sekretario:

Dr. Petr Chrdle,  
Anglická 878, CS-25229 Dobrichovice.  
Telefakso: +42-2-9911041.



## Faka aplikado

### Ora medalo por E-filatelistoj

La E-Sekcio de Ĉeĥoslovakia Filatelista Asocio organizis internacian ekspozicion inter la 25-a de julio kaj 2-a de aŭgusto en la sudmoravia urbo Straznice. Por propagandi la ekspozicion, la ĉeĥoslovaka poŝto ekde marto jam uzis specialan porokazan afrankomaŝin-stampilojn en la poŝtoŝtampiloj de Straznice kaj en du proksimaj urbetoj.

La ekspozicion vizitis eksterlandanoj el pli ol 30 landoj, eĉ ekz. el Venezuelo aŭ Koreio. Apud alitemaj eksponaĵoj estis prezentitaj ankaŭ eksponaĵoj je la temo "Esperanto". Estis eldonita dulingva (ĉeĥa kaj esperanta) ekspozicia katalogo, kiu krom la eksponaĵoj enhavis ankaŭ plurajn fakajn artikolojn.



Plej altan premion de la ekspozicio, la malgrandan orumitan medalon kun *Premio de la Ekspozicio* gajnis la eksponaĵo "Esperanto en filatelo" de s-ano Vlada Hasala el Straznice!

En la ekspoziciaj tagoj la urbaj poŝtoŝtampiloj uzis du diversajn esperantajn afrankomaŝin-stampilojn!


Pri pliaj detaloj interesitoj turnu sin al:

Vladislav Hasala,  
pk. 34, CS-696 62 Straznice,  
Ĉeĥoslovakio.

## Faka seminario en Prago

1993-03-12/15 okazos en Prago faka seminario "Fakaj aplikoj de esperanto ĉe (sed ne nur ĉe) Fervojoj", komuna aranĝo de Faka Aplika kaj Terminara Komisionoj de IFEF.

Estas planata kaj faka kaj turisma programoj, kaj speciala programo por akompanantaj personoj.



Pli da informoj kaj aliĝilon vi ricevos de gvidanto de FAK de IFEF:

Petro Chrdle, Anglická 878, CS-25229 Dobruŝovice, fakso: +42-2-9911041.

## Medicinistoj, kontaktu nin!

La Medicina Instituto ĉe la E-Asocio de Shandong-provinco komencis elementan kurson en la hospitalo, kies direktoro plene



subtenas la internacian lingvon. La kurson gvidas s-ro Cui Guoqing.


Esperantisto aŭ E-organizo, kiu volas interŝanĝi spertojn en tia lernado, skribu al:

Medicina Instituto,  
Nr. 136 Shengli Lu, Zaozhuang,  
Shandong Ĉinio.  
EPC, 11/92

## Ĉinaj specialistoj por agrikultura laboro

Instituto de Moderna Agrikulturo "Academia Sinica" ofertas siajn konojn kaj homajn fortojn por helpi kreskigi legomojn.

Oni povas elekti la deziratan legomon kaj produktan manieron (subĉiela aŭ tegmentita). Post anticipa esploro ni difinos la atendeblan kvanton en la koncerna teritorio. La agrikulturan laboron faros alsendotaj ĉinaj specialistoj.



La akcepta flanko devas certigi la bazajn surlokaĵajn kondiĉojn. La pagmaniero (mono aŭ eventuale iu varo) aparte diskutblas.

Pli detalajn informojn petu ĉe:

Academia Sinica, Prof. Shen Chenru,

935-203 Bao Fu Si,

100086 Beijing, Ĉinio.

Telefakso: +86-1-8011095.

## Kontakto serĉata

La Odesa Societo de Kolektantoj serĉas kontaktojn al individuoj aŭ societoj, okupiĝantaj pri kolektado de moneroj (numizmatikaĵoj) kaj filatelo.

Skribu al:

Eŭgeno Boriskov,  
ul. Magistrálnaja 68/B,  
UKR-270120 Odessa, Ukrainio.

## La eksperimento en Slavjansk

En 1912 la franca gazeto "Excelsior" organizis tradukkonkurson inter esperanto kaj naciaj lingvoj (angla, germana, hispana, itala, rusa). Al ses tradukistoj oni disdonis francan literaturan tekston por traduki ĝin al la menciitaj ses lingvoj. Poste la tradukaĵojn oni transdonis al aliaj ses tradukistoj por traduki ĝin inverse en la francan. Laŭ posta prijuĝo de kompetentuloj la retraduko peresperanta estis la plej ĝusta.

Okdek jarojn post tiu konkurso en Ukrainio okazis simila konkurso inter esperanto kaj la angla. Pri ĝi - ĉi sube.

En urbo Slavjansk (donecka regiono en Ukrainio) laŭ instrukcio de la rektoro de Internacia Instituto de Manaĝado, prof-ro F.I. Podubnij, komence de la studjaro 1992 oni formis du grupojn el la 300 studentoj de la unua kurso. En la unuan grupon estis elektitaj studentoj, en kies abiturientaj diplomoj

estas altaj poentoj pri angla lingvo (post 6-7-jara lernado de la lingvo); en la duan - kun ajnaj poentoj. Oni organizis du ekspreskursojn: por la unua grupo de angla lingvo; por la dua - de esperanto. Ambaŭ tiuj lingvoj estas devigaj studobjektoj en la Instituto. La tasko por ili estis fine de la kursoj prepari surscenejan prezentadon en la lernitaj lingvoj.

La grupoj havis malsamajn kondiĉojn, ja la "esperantistoj" komencis de nulo. Esperanton instruis sep kompetentaj instruistoj, inter ili prezidanto de Ukrainia Esperanto-Asocio (UkrEA) Cibulevskij D.M. kaj la vicprezidanto Ŝilo G.M. La gvidantoj de tiu kurso formas en la Instituto katedron de esperanto - la duan en historio de esperanto-movado! (la unua malfermiĝis en 1966 en Budapeŝta Universitato).

La studentoj ĉiutage lernis po ok horoj, dum la lernado estis preparata ankaŭ la postkurso programo. En la kvina tago la partoprenantoj *ekparoladis en esperanto*, kaj semajnon post la komenco de la ekspres-

kurso okazis la prezentado de la esperantlingva sursceneja programo (kantoj, deklamadoj, spektakloj, fabloj, anekdotoj, ŝercoj) - ĝi estis ege impresa!



Spektinte la prezentadon la instruistoj de la unua (anglalingva) grupo malĝojigis kaj ili petis ankoraŭ tri semajnojn por daŭrigi ilian ekspreskurson. Post tio okazis la anglalingva prezentado, kiu daŭris nur 20 minutojn, kaj konsiderindan parton de tiu tempo okupis trumpetmuziko...

La eksperimento, farita en Slavjansk danke al prof. Podubnij, montris sendubajn avantaĝojn de esperanto kompare al la angla.

Mihail Popov, Ukrainio  
akademiano de AIS

Kontaktadreso:

Internacia Instituto pri Manaĝado, pk. 17,  
UKR-343206 Slavjansk.

aŭ M.T. Popov, Melitopolska 4-12, UKR-332440 Berdjansko, Ukrainio.

## Interŭjuo

De la 7-a ĝis la 14-a de aŭgusto 1993 okazos la 49-a Internacia Junulara Kongreso. La prezidanto de LKK (Loka Kongresa Komitato), **Ljubomir Trifončovski** respondas al la demandoj de *Bulgara Esperantisto*.

### Post tridek jaroj - denove en Vraca


**Ljubomir Trifončovski (1958-), dramaturgo, estas tre konata nomo en la internacia junulara esperanta movado. Li partoprenis plurajn IJK-jn kaj aliajn internaciajn junularajn aranĝojn. Ses jarojn li estis komitatano de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), ankoraŭ tiom da jaroj li dediĉis al Bulgara Esperanto-Junularo (BEJ) kiel estrarano. De 1990 li respondecas pri la junularo en la Estraro de Bulgara Esperanto-Asocio. Evidente lia riĉa organiza sperto igis TEJO-n enoficigi lin kiel prezidanton de LKK de la 49-a IJK en Vraca.**

**Bulgara Esperantisto (BE): Kial do en Vraca?**

**Ljubomir Trifončovski (LT):** Eble oni povus demandi, kial en Bulgario. En 1963 en Vraca okazis la 19-a IJK, kaj post dekkvin jaroj - en 1978, la 34-a - en Veliko Tarnovo. Jen tridek jarojn post Vraca kaj dekkvin jarojn post Veliko Tarnovo tiu plej granda kaj plej grava junulara esperantista evento denove okazos en nia lando.

De unu flanko tio estas rekono de niaj tradicioj. Kiam antaŭ dek jaroj la tiam Estraro de BEJ provis inviti internacian junularan kongreson en Bulgario, la respondo ne estis pozitiva - la politiko de TEJO estas fari kongresojn tie, kie estas bezonata plifortigo de la nacia junulara esperantista movado. Tiam ni havis fortan junularan movadon. Sed nun la situacio estas tre ŝanĝita: BEA havas siajn problemojn, kaŭzigitajn ĉefe de la transformoj je makrosocia nivelo; la junularo en Bulgario agas disigite kaj senhelpe, apenaŭ nun denove formiĝas, nature formiĝas, iu

junulara esperantista centro ĉirkaŭ grupo de junaj aktivuloj kaj intelektuloj. Kaj la kongreso kolektos la fortojn de la nova generacio, en kiu certe estas homoj kapablaj kaj talentaj.



Sed mi revenu al via demando. Denove en Vraca, ĉar la organizantoj kaj partoprenantoj en la 19-a IJK multfoje instigis nin organizi en 1993 ion, dediĉitan al la kongreso okazinta antaŭ tridek jaroj, kiu por sia tempo estis la plej amase vizitata kaj interesa. Denove en Vraca, ĉar tiu urbo, tradicie esperanta, lastatempe konfirmiĝis kiel la plej aktiva centro en nia lando.

**BE: Ĉu jam komenciĝis la preparlaboroj?**

**LT:** Efektive jes. LKK ekfunkciis. Pretas la kontrakto kun TEJO. La kotiztabelo aperos en *TEJO-Tutmonde* kaj *Bulgara Esperantisto*. La urbestro de Vraca jam engaĝis sin por la kongreso. La postkongreso estos en Bulgario - ni antaŭvidas ripozon de niaj eksterlandaj amikoj ĉe Nigra Maro kaj rondvojaĝon tra la lando.

**BE: Ni scias pri viaj interesoj al la esperantaj literaturo kaj teatro, al la sociologiaj problemoj de la esperanta komunumo. Kaj ĉu la 49-a IJK fariĝos kongreso literatura kaj sociologia?**

**LT:** Ho, ne! La kongresa temo estas tute alia - "Ekonomia kaj socio en ŝanĝ-

iĝo". Tamen estos programeroj kaj seminarioj pri la esperanta literaturo, kulturo, historio, movado - la nova generacio devas scii ĉion pri esperanto. Kaj ni certe helpos por tio.

Ni strebos proponi riĉan amuzan kaj sportan programojn, kursojn kaj fakkunvenojn. La kongresanoj prezentos sin ne nur dum la Internacia Vespero, sed ankaŭ dum ĉiuj aliaj vesperaj programoj - la kongreso estas ne nur por, sed ankaŭ de la kongresanoj, ĉu ne? Sed la ĝusta programo dependos finfine multe de la subvencioj, kiujn ni atendas kaj ricevos.

**BE: Ĉu la kongreso estos subvenciata de TEJO aŭ BEA?**

**LT:** Ne. La kongresa buĝeto formiĝas el kongreskotizoj, subvencioj kaj donacoj. Mi tamen esperas, ke BEA certigos subvencion al la bulgaraj kongresanoj, por ke la kongreskotizo por ili ne aspektu tiom alta. Ankaŭ donacemaj esperantistoj povus helpi nin, kaj mi speciale alvolas la partoprenintojn de la 19-a IJK en 1963 fari siajn donacojn.

**BE: Se la kongreskotizo estas alta, ĉu tio ne malaltigos la nombron de la kongresanoj?**

**LT:** La kongreskotizo por la eksterlandanoj aspektas normala. Por bulgaroj ne tiom, ĉar la ekonomiaj cirkonstancoj en nia lando ne favoras la malriĉajn bulgarojn. Tamen ni proponos al multaj junaj bulgaroj per plenumo de diversaj servoj certigi por si rabaton aŭ monhelpon kaj tiel kongresumadi pli malmultekoste.

**BE: Ĉu jam ekzistas interesiĝo al la kongreso?**

**LT:** Jes. Junularaj organizoj jam demandas pri la kotizoj, transpago, partopreno en la programeroj, perado k.a. La kongreso estos ŝanco kaj por la junaj bulgaraj esperantistoj, kaj por la eksterlandaj geamikoj. Do, bonvenon en Vraca! Ni atendas vin!

*laŭ Bulgara Esperantisto, 7/92.*

## NOVAJ STATUTOJ...

"La novaj statutoj de KEA (*Kuba Esperanto-Asocio*) estis ĵus aprobitaj de la Ministerio pri Justico. Do, ni unue devas serioze studi ĝian tekston - kaj poste enkonduki ĝin en la ĉiutagan laboron".

*el "La Noktuo, n-ro 1", informilo de KEA*

*Se ni bone komprenas, la nova statuto estas farita en la ministerio, kaj la jamaj membroj de la asocio devas studi la tekston por ekscii kion ili mem decidis... N.d.l.r.*

## Komenio - ĉu la patro de la ideo pri la internacia lingvo?

En la nuna jaro multe oni aŭdas kaj legas pri Komenio (naciilingve Jan Amos Komensky; latine Comenius) okaze de lia 400-a naskiĝdatreveno.

Li estis taksata "instruisto de nacioj", eĉ la nuntempaj adeptoj de la internacia lingvo nomas lin "la patro de interlingvistiko". Lian klarvidon pravas, ke li antaŭvidis la realiĝon de la radiofonio kaj televido. Same li antaŭdiris internacian lingvon, eĉ li reale laboris pri supernacia internacia lingvo (nuntempe nomata "planlingvo"), kaj formis kelkajn skizojn de tia lingvo.

Ni, esperantistoj vidas en la lingvo esperanto plenumon de la revoj kaj realismaj klopodoj de Komenio. La tutmonda aŭtoritato de Jan Amos Komensky subtenas la klopodon de la adeptoj de esperanto kontraŭ nekredantoj. En tia lumo estus ago senpripensa konsideri absurdaĵo la internacian lingvon. Laŭ d-ro J. Hybl, direktoro de Komenio-Muzeo en Prerov (Ĉeĥoslovakio): Komensky estas la patro de la ideo pri esperanto".

*Jaroslav Marik,  
Zitná 32, CS-120 00 Praha 2, Ĉeĥio*

## I L E I

### Ĉu fari lernejan ekzamenon en Aŭstrio?

Mi legis, ke AEI (*Aŭstria Esperanto Instituto*) intencas instali esperanto-ekzamenon en tri ŝtupoj. Bone, sed mi sugestas ne forgesi la eblecojn de ŝtataj ekzamenoj, kiuj jam ekzistas. (Mi tre dubas, ĉu iam estonte oni povos restarigi la apartan ŝtatan ekzamenkomisionon por esperanto, ĉar mankas leĝa bazo por tia komisiono).

Kiel vi scias, nun ekzistas ŝtata instruplano por esperanto kiel libere elektelebla studobjekto en la 3-a kaj 4-a klasoj de la ĉeflernejo. (Fakte, laŭ mia scio, nuntempe en neniu ĉeflernejo e-o estas instruata). Laŭ la nun validaj dekretoj de la instru-ministerio, ĉiu havas la eblecon anonci sin por "eksterula ekzameno" (*Externistenprüfung*) pri e-o en iu ĉeflernejo. Kompreneble tiukaze la lerneja instanco, kiu estas kompetenta por tiu lernejo, devas en tiu kazo komisi iun ekzamenanton. Tio signifas, ke fakte tia ekzameno povus okazi nur sub la kondiĉo, ke proksime de la elektita ĉeflernejo atingebblas instruisto kun instrukapablo por esperanto, do ekz. en Vieno, Graz, eble Linz... En la ekzameno oni devas prui tiun nivelon de lingvoscio, kiu korespondas al la menciita instruplano por la ĉeflernejo.

Estus grave eluzi tiun eblecon, por ke la lernejoj instancoj rimarku, ke en Aŭstrio entute ekzistas intereso por esperanto. Kiel dirite, iu ajn povas fari tion (eĉ "senioroj" kaj eksterlandanoj).

D-ro Klaus Perko, Aŭstrio  
el *Aŭstria E-Revuo*, 10-12/92.

Ĉu vi jam konas ĝin?

### Ruslanda Esperantisto

La unua numero de *Ruslanda Esperantisto* aperis en 1905, kaj la gazeto aperadis ĝis la malpermeso de la Ruslanda Ligo Esperantista (1911) pro la aresto de ties prezidanto A. Postnikov.



En julio 1991 *Ruslanda Esperantisto* reaperis, kaj de tiam akurate aperas ĉiumonate. Krom la aktualaj movadaj informoj *Ruslanda Esperantisto* publikigas materialojn pri historio de esperanto, esperantologiajn artikolojn, recenzojn, literaturaĵojn, prezentojn de ruslandaj aktivuloj. En la gazeto oni povas de tempo al tempo vidi noticojn pri la plej akutaj sociaj eventoj (ekz. la aŭgusta n-ro '91 estis dediĉita al la fiaskinta puĉo).

*Ruslanda Esperantisto* aboneblas ĉe UEA kontraŭ 15 guldenoj (kodo: AVKO-U). Pronumero haveblas kontraŭ 2 IRK ĉe la redakcia adreso:

*Ruslanda Esperanto-Asocio*,  
pk. 67, *RUS-620077 Jekaterinburg-77, Rusio*.

### Membroj de PASPORTA SERVO!

Ĉu vi ne forgesis  
rosandi vian realigilon  
al la sekvajara adresaro?

## Movado

### Pri la "Interna Ideo"

En Esperantujo mi ĉiam vidis fenomenon nekredoblan: ĉiam eliminiĝis de esperanto tiuj homoj, kiuj alvenis al ĝi nur pro lingva intereso, nur pro ludo, amuzo. Ĉiam forfalas de esperanto tiuj, kiuj komprenis ĝin kiel ludilon, nuran interkomprenigilon.

Sed restis tiuj, kiuj serĉis en esperanto ion pli ol la lingvo, do eble tiun al ni konatan internan ideon, komunan senton.

Zamenhof estis judo, kaj la judoj vivis en diasporo, kiujn ligas iliaj lingvo kaj religio. Nin esperantistojn jes forte ligas la lingvo kaj apenaŭ la religio, sed nin ligas tiu komuna interna ideo, tiu malfacile priskribebbla komuna interna sento. Ĝuste tio ĉi gvidas nin al iu neŭtraleco.

Tomasz Chmielik, Polio  
laŭ *TEJO Tutmonde* 6/91.

## Usona filio de LIBE

Blindaj esperantistoj el Usono! Se vi ŝatus helpi starigi usonan filion de LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj), bonvolu skribi vian nomon kaj adreson al Roan Orloff Stone, Rt. 1, Box 46C, Hallsville TX-75650, Usono.

"La Ondo de Esperanto", n-ro 3.

## Movada lernejo

### Kio ĝi estas AIS?

AIS (Akademio Internacia de Sciencoj SAN MARINO) estas la komuna agadpodio de fake elstaraj kaj lingvopolitike progresemaj sciencistoj en la tuta mondo, kiuj celas internacilingve pliefiki la esploron kaj instruon de ĉiuj sciencoj... Ĝi estas libera institucio en la libera ŝtato San Marino (la plej malnova kaj plej malgranda eŭropa respubliko). La ŝtato San Marino donas juran bazon kaj materialan helpon, sed ne tuŝas la liberecon de la scienca instruado kaj esploro.

AIS nek volas, nek povas anstataŭi la Akademion de Esperanto aŭ ajnan alian organizaĵon de la esperanto-movado. La ununura laborlingvo de la Senato, de la Ĝenerala Asembleo kaj de la ekzamenkomisionoj de AIS estas la internacia lingvo; tamen, la Statuto deklaras ankoraŭ kvar oficialajn lingvojn de AIS: la italan, la francan, la germanan kaj la anglan...

### Kiel ekestis AIS?

Pro instigo de sciencistoj el la "Eŭropa Klubo" la sanmarina ministrino pri klerigo kaj kulturo, Fausta Morganti prezentis proponon pri starigo de la Akademio, kiun la "Congresso di Stato" per sia decido N 58 favore prijuĝis la 19-an de majo 1983. La iniciatgrupo AIS de Eŭropa Klubo preparis la unuan Sanmarinan Universitan Sesion (SUS 1), per kiu la scienca laboro de AIS fakte jam en 1983 komenciĝis (dum ĝi establiĝis La Internacia Scienca Kolegio - ISK, plenumanta ĉi sciencan laboron. La oficiala fondo de AIS per ĉeadvokata subskribo de la Statuto okazis la 13-an de septembro 1985. AIS surbaze de prijuĝo fare de internacia komitato agnoskas studojn, kompletigajn ĉe universitatoj aŭ aliaj altlernejoj per havigo de internacia sciencista grado:

- "bakalaŭro" (Bak.) - post almenaŭ 2-3-jara studado;
- "magistro" (Mag.) - post almenaŭ 2 postbakalaŭraj studjaroj;



- "doktoro" (Dr.) kaj "habilita doktoro" (Dr. gabil.) - pro posta esplorado.

Tiuj titoloj estas akireblaj ankaŭ originale per studado kaj ekzameno okazante grandparte ĉe docentoj de AIS.

AIS subtenas finance (aldone al la jura kaj materiala subtenoj fare de la Respubliko San Marino) la "Subtena Sektoro"-n, al kiu la Statuto de AIS koncesias certan memadministradon, kaj la neformalan "Internacia Scienca Kolegio"-n (ISK), el kiu AIS aligas siajn efektivajn membrojn kaj adjunktojn kaj invitas siajn prelegantojn. Al la

Subtena Sektoro apartenas momente 158 personaj kaj 9 kolektivaj subtenaj membroj. Al ISK aliĝis jam preskaŭ 800 sciencistoj el 52 landoj de ĉiuj kontinentoj.

Por pli detalaj informoj turnu vin al la Sekretariejo de AIS:

Kleinerberger Weg 16/B,  
DW-4790 Paderborn, Germanio.  
El "Esperanto-Centro Informas"  
(Ukrainio), N-ro 9. (17.) 1992.



### Refoje pri la simbolo de Esperanto

„La simboliko por la plimulto de la movadanoj ne estas racia, sed emocia afero” — mi skribis tiun frazon en la 8. numero de *EVENTOJ*. Brile pruvis tion la alparolo de Will Green en la numero 11. Tiel brile, ke indas analizi liajn asertojn.

„... mi eĉ ne unu fojon aŭdis plendon, kaj oni neniam eĉ unu fojon al mi esprimis «neceson de radikala ŝanĝo»”. — Ni ne dubas, ke pri la simboloj neniu telefonis aŭ skribis leteron al S-ro Will Green. Tamen: la libroj kaj revuoj aperantaj en Esperantujo direktigas al ĉiu esperantiingvulo. En la sepdekaj jaroj aperis *duvoluma* libro pri la problemo (Manfred Günter: Manlibro de varbado), do la problemo sendube estis lanĉita. Kaj kiam en la lastaj jaroj aperis novaĵoj en la E-gazetaro pri tio, ke unu asocio post la alia forlasis la stelon, oni povis konstati, ke la problemo estas *tromatura*. Do, jam multaj sentis neceson de ŝanĝo. Kaj multaj aliaj — ne apartenis al ili. Racia afero estas vidi ambaŭ tendencojn, emocia afero estas vidi nur tiun el ili, kiu plaĉas al ni.

„Povas esti, ke inter la amikoj de la aŭtoro iuj novaj esperantistoj, senspertuloj, sentis tion.” — Tute ne. La novuloj akceptas la tradiciojn tiel, kiel ĝi estas. Spertuloj lanĉis la problemon. Kaj miaj amikoj antaŭ dek jaroj estis tradiciuloj. Nun la plimulto de la (samaj) amikoj (do: ne novuloj) jam inklinas al la ŝanĝo.

„La tradicioj ne estis al mi ĝenaj. Al kiu? Eble al tiuj, kiuj ne povis vidi la valoron de kontinuo kaj daŭrado, de establiĝinta simbolo.” — Al kiu? Jen la preciza respondo: al tiuj, kiuj la efiikecon taksas pli granda valoro, ol kontinuo kaj daŭrado.

„La vorto „liberiĝi” estas alia nevera kaj ĵurnalista vorto por kredi, ke la movado estas iel katenita. Ĝi ne estis kaj ne estas.” — Kvan-

kam ne estas en la Zamenhofa Proverbaro, sed ekzistas rusa proverbo: „Mortinto tenas la piedon de la vivantoj.” Sed ne nur en Rusio. Katenoj de tradicioj ekzistas en ĉiu socio. En Esperantio oni flankenmetis unu katenon por unu jaro (1987), kaj nun oni ne sukcesas remeti ĝin. La fantomo de la nova E-simbolo ne volas reiri en la jubilean botelon.

Ĉu la simbolo de Esperanto ne estas elasta? Ekde la 11-a numero de *Eventoj* ĝi aperas kun *nigra* stelo kaj la surskribo ESPERANTO. Certe Vi ĝisvivos ankoraŭ multajn aliajn variantojn.

Multaj pli kaj pli sentis la neceson de radikala ŝanĝo, sed ĝis 1986 la movado ne povis liberiĝi de la jam tre ĝenaj tradicioj, skribis mi. „Tia estas ja ĵurnalista taktiko por kredi sian argumenton ĝusta.” — La fakto estas, ke ekde 1986 disvastiĝas la E-simbolo. Kial? Mi provis respondi. Eble mi eraris. Eble ĉiuj miaj argumentoj estas malĝustaj. Bone. Sed restas la faktoj. Kial jaron post jaro novaj E-organizaĵoj aliĝas al la nova tendenco? Kial disvastiĝas la nova E-simbolo?

Árpád Rátkai, Hungario

*Pertiu letero ni finas la ĉi-teman diskuton. Ĉiu ja povas uzi tiun aŭ alian simbolon. Sur la titolo de EVENTOJ ni kombinis ilin, ja ambaŭ havas sendubajn meritojn. En aliaj niaj eldonaĵoj, sur afiŝoj, libroj, - celantaj la neesperantistan publikon ni uzas nur la novan pro ĝiaj avantaĝoj, samtempe sur niaj vestoj konstante ni portas la malnovan, kiel simbolo de nia aparteno al la E-komunumo.*

Szilvási László

\*\*\*\*\*

„La nova gazeto *EVENTOJ*, kiu aperas de marto de ĉi-jaro, kvankam enhavas multe da informoj, ne tro plaĉas al ni. Mankas en ĝi iu spirito de esperanta ideo - alivorte ĝi estas kiel telefona libro, do nur por klara informado, kio certe havas jam apartan valoron.”...  
*el Varsovia Vento, Ireneusz Bobrzak, Polio.*

Kara Ireneusz,

ni dankas la sincerajn vortojn. Eble pri la rolo kaj taskoj de e-gazetoj ni havas malsaman opinion. Tamen ni promesas konsideri vian kritikon ĉe la elformado de la estonta stilo kaj enhavo de *EVENTOJ*. Multajn sukcesojn por *Varsovia Vento*.


La red.

## Jubileo en Murmansk!

La 25an de februaro Murmanska E-Klubo celebros sian kvinjarigon. Jes! Antaŭ kvin jaroj okazis dusemajna kurso, gvidata de Elvira Gacenko, veninta el Volĵskij, Volgograda regiono, kaj pli ol 20 junaj esperantistoj decidis starigi E-klubon.

Nun ni jam instruas mem. Ĉijare denove funkcias e-rondeto por lernejaĵoj, kaj por plenkreskuloj. Malgraŭ la nuna ne sufiĉe favora ekonomika

situacio, inflacio ktp. ni korespondadas kaj partoprenas E-aranĝojn.



Karaj gesamideanoj, leĝantoj de *EVENTOJ*! Viaj gratuloj instigos niajn esperantistojn pli diligente lerni la lingvon, kaj pli aktive partopreni la movadon. Antaŭdankojn al Vi.

La adreso de la klubo:


Anatolij Liĉ, prez.,  
alĵa, 4714, RUS-183050  
Murmansk, Rusio.

## Esperanto en radio

### Fariĝu kunlaborantoj de Pola Radio

La Esperanto-redakcio de Pola Radio petas al ĉiuj esperantistoj per siaj kritikoj kaj rimarkoj fariĝi kunlaborantoj de ĝi. Provu respondi al la jenaj demandoj:

- Kion vi pensas pri la estonteco de la kunlaboro sur nia eŭropa kontinento? Kian rolon povas ludi en tio komuna lingvo?
- Kian rolon en la eŭropa kunlaboro povas ludi vasta interpopola informado kaj kian rolon en tio ludas la radioelsendoj?
- Kiel vi pritaksas la esperanto-elsendojn de Pola Radio? Kio estis bona kaj kio malbona? Kion vi atendas de ĝi, kiujn temojn ili traktu iom pli vaste?



### Redakcioj bezonas informojn

Por ke la radiostacioj povu informi, ili devas unue ricevi informojn. Tial estas necese, ke ĉiuj sendu ilin: esperantistoj pri sia aktiveco, asocioj kaj grupoj sendante siajn informilojn kaj bultenojn (tio samtempe estas bona informado pri la revuoj mem).

Pola Radio, Esperanto-Redakcio,  
pk. 46, PL-00-950 Warszawa, Polio.

## Alvokoj

Hispana Esperanto-Federacio por informi la hispanajn esperantistojn kaj interesigantojn, petas de:

- **FAKAJ ASOCIOJ:** Bonvolu sendi modelon de aliĝilo kaj informilojn pri agado.
- **ĈIUJ E-PERIODAĴOJ:** Bonvolu sendi modelon de abonilo.

Esperante je via konscio pri nia komuna intereso:

Hispana Esperanto-Federacio,  
Rodriguez San Pedro 13-3&-7,  
E-28015 Madrid, Hispanio.  
Telefono: +34-1-4468079.

## Anoncetoj

Anoncetoj,  
kiuj havas ian ajn rilaton al esperanto,  
estas senpagaj!

**KION NI FARU** por ke nia lingvo baldaŭ estu instruata en ĉiuj lernejoj tutmonde? - Informas S-ro André Grossmann, 5 rue des Pyrénées, F-68390 Baldersheim, Francio. (Bonvolu sendi koverton kun via adreso kaj 2 int. respondkuponojn).

Mi estas filatelisto kaj specialiĝis al la kolekto de E-stampoj. Mi volonte kontaktus saminteresulojn, aŭ akceptus E-stampitajn kovertojn, aŭ ties ofertojn.

István Szabó, Kiserdősor 37,  
H-3700 Kazincbarcika, Hungario.

Hungaraj laboruloj deziras dungigi en okcidento, ankaŭ porokaze. Perantoj rekomencitos laŭ anticipa interkonsento. Kontak-tadreso:

Imre Horváth,  
Fő u. 36, H-9156 Czakóháza, Hungario.

"Monda Panoramo" estas internacia koresponda ludo por kolektantoj de bildkartoj, ĝia "Suplemento" estas informservo per kaj por Esperanto! Aliĝilon petu (kun IRK, Suplemento +2 IRK) ĉe:

**SORTIMENTO**, Imre Bajáki,  
Dr. Holló Lajos u. 61,  
H-6100 Kiskunfélegyháza, Hungario.

36-jara brazila geologiisto serĉas hungaran kontakton, por interŝanĝi kasedojn kaj librojn, eldonitajn/fabrikitajn kaj aĉetebajn en Budapeŝto.

Pekim Vaz, Caixa Postal 182, Belém-PA,  
66017-970 Brésil, Brazilio.



Feliĉan novan jaron  
al ĉiuj legantoj de **EVENTOJ**

EVENTOJ, eszperantó nyelvű információs lap.  
Nyf. sz.: B/TSZL/85/1991. ISSN 01215-959 X.

A kiadó és a szerkesztőség címe:  
H-1675 Budapest, pf. 87. Tel.: 1288258.  
Megjelenik kéthetente. Kézbesíti a HELIR.

Készült az M & M nyomdában:  
H-1161 Budapest, Tordai u. 15.

EVENTOJ, dusemajna gazeto pri la esperanto-movado.  
Eldonas Kultura Esperanto-Asocio  
kaj LINGVO-Studio, Budapest.

Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro László Szilvási.  
La redakcio ne nepre konsentas pri la enhavo de unuopaj artikoloj, kaj ne respondas pri la anonc-enhavo.

## Kiel aboni al EVENTOJ?

1. Plenigu la abonilon, aŭ skribu leteron kun la sama enhavo, kaj sendu ĝin al la redakcio (**LINGVO-Studio, H-1675 Budapest, pk. 87. Hungario**).

2. Pagu la abonkotizon al vialanda peranto listigitaj sube en la koncerna nacia valuto kaj sumo. La baza abonkotizo por 1993 estas 59 guldenoj, (aere: 68 guldenoj), por orient-eŭropaj landoj: 23 guldenoj.

3. La revuon vi ricevos rekte el Hungario perpoŝte.

## Kiel pagi?

- Sendu la kotizon al vialanda kotizperanto (perpoŝte aŭ poŝtĝirkonte) - en nacia valuto.

- Sendu la monon al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, kodo ELLS-S, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. (59 gld, aere: 68 gld.)

- Sendu la monon rekte al la redakcio per simpla internacia poŝtmandato, aŭ perbanke al Banko OTP, Budapest XVIII, Konto 218-98189/542-030808-7. Vi povas sendi ankaŭ euroĉekon. La valuto sur ĝi devas esti en ajna tipo de konvertebla valuto. Sur la dorsa flanko nepre skribu la numeron de via bankkonto!

- En fina kazo - je via risko - sendu monbiletojn (en konvertebla valuto inkluzive forintojn) en fermita koverto al la redakcio.

## Landaj kotizperantoj

**Aŭstralio:** Libroservo de EAE, Tom Elliott, Pk. 230, Matraville, 2036 N.S.W.

**Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, A-3400 Klosterneuburg (pĉk. 7.127.144). -345 ATS.

**Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). - 1080 BEF, aere: 1250 BEF.

**Brazilio:** Brazila Esperanto-Ligo, Cx. Postal 03625, Brasilia (DF) 70084.

**Britio:** Paul Hewitt, 26 Highfield Rd, North Thoresby, Grimsby, S. Humbs, DN36 5RT. - 22 GBP, aere: 25 GBP.

**Bulgario:** Ljubomir Trifončovskij, Al. Stambolijski 17, ap. 11, BG-3000 Vraca. - 330 levoj.

**Ĉeĥoslovakio:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Vladimír Dvorák, Jiřka 10, CS-110 00 Praha-1. - 360 KCS.

**Danio:** Eckhard Bick, Rugbjergvej 98, DK-8260 Viby-J. (Poŝtĝirnumero: 696 47 37)

**Finnlando:** Oy Mendoservo, Lasse Kivis-

tö, Kivistöntie Hyvinkää, SF-05510.

- 166 FIM, aere: 192 FIM.

**Francio:** UFE, 4. bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk. 855-35 D Paris).

- 185 FRF, aere: 215 FRF.

**Germanio:** Monda Markato, Alfred Schubert, Pf. 1539, DW-8120 Weilheim, (konto 365255-806, postgiroamt München, BLZ 700 100 80). - 54 DEM.

**Hungario:** LINGVO-Studio, H-1675 Budapest, pk. 87. - 980 Ft.

**Hispanio:** Juan Azcuénaga Vierna, General Dávila 127, p.7, 2ª izda, E-39007 Santander (Cantabria) Bankkonto ĉe Caja Postal n-ro 03548531 (O.P.)

**Islando:** Libroservo de IEA, Saemundsson Hallgrímur, Godatuni 10, IS-210 Gardabae.

**Israelo:** Aviv Faklieru, Pk. 8383, IL-61083 Tel-Aviv, (konto 403679, Bank Mizrahi, Faklieru Esperanto).

**Italio:** Itala Esperanto-Federacio, via Villorosi 38, I-20143 Milano (pĉk. 37312204).

- 46 m ITL, aere: 53 m ITL.

**Japanio:** Rondo Harmonia, Yamaguti Sin'iti, Tutihara 3-205, Tenpaku-ku, J-468 Nagoya-si. - 4600 JPY, aere: 5300 JPY.

**Koreio:** Seula E-Kulturcentro, Jung-Ke Lee, C.P.O. Box 3047, Seoul, 100-630.

**Kroatio:** Kroatia E-Unuigo, M. Belošević, Trg Burze 2, HRV-41000 Zagreb.

**Norvegio:** Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo, poŝtĝirkonto 0809 5100318.

**Polio:** P.W.H. NEPO, skrytka 105, Maciej Wnuk, ul. Broniewskiego 77. m. 137, PL-01865 Warszawa.

- 236.000 PLZ.

**Portugaliao:** Libroservo de Portugala Esperanto-Asocio, Rua rd. Joao Couto 6, R/C-A, P-1500 Lisboa.

**Sud-Afriko:** Colin Beckford, PO Box 1227, SA-8000 Cape Town.

**Svedio:** Sveda Esperanto Federacio, SEF, c/o Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby.

**Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen.

- 47 CHF, aere: 54 CHF.

**Usono:** E-Ligo por Norda Ameriko, Mike Donohoo, POB 1129, El Cerrito, CA-94530. - 35 USD, aere: 40 USD.

**Venezuelo:** Prof. J. E. Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A.

sendu al: **EVENTOJ**, H-1675 Budapest pk. 87, Hungario

## ABONILO

Jes, mi abonas al la gazeto **EVENTOJ** por 1993.

Familia nomo, nomo: .....

Preciza adreso: .....

..... poŝta kodo: .....

La abonprezon de ..... (sumo) mi pagis al: .....

Dato:..... Subskribo:.....